La Hodiaŭa Ĵurnalo
2017-12-03 n-ro 374

# La Maraj Popoloj



Argentino: diktaturo: porĉiama malliberejo pro la «mortoflugoj» de la ESMA

Verdaĵ-kovritaj tegmentoj malvarmigas

Aviadilo faris krizan alteriĝon pro nomo de sendrata reto

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Argentino: diktaturo: porĉiama malliberejo pro la «mortoflugoj» de la ESMA
*Krimoj plenumitaj kontraŭ 789 personoj p. 03*

La Maraj Popoloj
*La enigmo de la 3 200-jaraĝa skribaĵo p. 04*

Verdaĵ-kovritaj tegmentoj malvarmigas
*Kiel forigi someran varmegon el urbegoj? p. 06*

Aviadilo faris krizan alteriĝon pro nomo de sendrata reto
*"Enaviadiligita bombo" p. 07*

Hodiaŭe
*France Prešeren; Géza Laczkó; Ludvig Holberg; Seán Ó Ríordáin; kaj Ardeo p. 07*

# Argentino: diktaturo: porĉiama malliberejo pro la «mortoflugoj» de la ESMA

En Argentino, la plej grava proceso pri malobservado de la homaj rajtoj dum la diktaturo de la 70aj jaroj, finiĝis pasintan merkredon [29 nove 2017]. 54 eks-militistoj estis juĝataj pro krimoj plenumitaj kontraŭ 789 personoj en la Esma, Mekanika lernejo de la mararmeo, la plej granda kaŝcentro de la diktaturo. 29 malliberuloj estis kondamnitaj al porĉiama malliberejo kaj 19 al gravaj punoj de malliberejo.



Detenidas - Desaparecidas - Dictadura Argentina 1976-1983 - Presentes - Día de la Mujer

Paula DONADÍO, filino de elsaviĝintino de la ESMA, perdis kvar el siaj onkloj en tiu detencentro. Post la verdikto, ŝi emfazas la ekzemplecon de la proceso. «Tiu proceso estis gravega. Unue, ĉar ĝi demonstris la sisteman karakteron de la forkaptadoj kaj malaperigoj. Poste, ĉar por la unua fojo, oni povis juĝi la mortoflugojn. Tio estis unu el la rimedoj uzataj de la torturistoj, por seniĝide la korpoj de la malliberuloj, kiuj tiel fariĝis malaperintoj»

Dora LORIA pensas pri sia kuzino, malaperinta en mortoflugo. Ŝi salutas la decidon de la juĝistoj. «Justico, jen vera justico finfine. Kaj porĉiama malliberejo por la torturistoj! Mia sola kuzino, solfilino de miaj onkloj, estis detenita en la Esma, kaj eliminita en mortoflugo. Ŝi estis dekokjara». La aŭdiencoj de la proceso «mortoflugoj», tiel nomata, ĉar malliberuloj estis ĵetitaj vivantaj kaj drogitaj el la aviadilo en la kotaj akvoj de la *Rio de la Plata*, malfermiĝis en novembro 2012, en Bonaero.

La akuzitoj, eks-militranguloj kaj pilotoj, devis praviĝi pri la sorto de 789 viktimoj kaj pluraj miloj da malaperintoj dum la argentina diktaturo.

Justico do plenumiĝis. Sed la kulpuloj, same kiel dum la aliaj procesoj kontraŭ la diktaturo, respektis pakton pri silento, kiu ŝajne ligas la militistojn. Ili liveris neniun informon, kiu ebligus retrovi la korpojn de la malaperintoj.

Inter la malliberuloj de la Esma, troviĝis ambaŭ monaĥinoj Alice DOMON kaj Léonie DUQUET, arestitaj kaj malaperintaj en 1977, post denunco de la eks-kapitano Alfredo ASTIZ. Ili estis detenitaj en la Esma. La korpo de Léonie DUQUET estis retrovita en amastombejo kaj formale identigita en 2005.

Neniam Milito Inter Ni

# La Maraj Popoloj

La enigmo de la 3 200-jaraĝa skribaĵo, kiu troviĝis en *Afyonkarahisar* en Turkujo jam solviĝis.

La skribaĵo pruvis ke la "misteraj maraj popoloj" [1] estas el Anatolio aŭ Malgrandazio [2].



Por la unua fojo oni deĉifris antikvan skribaĵon, trovitan proksime al *Afyonkarahisar* urbo en la jaro 1878, en la Luvi-lingvo. La esploro farita per grupo de nederlandaj kaj svislandaj arkeologoj montris, ke la "misteraj maraj popoloj", kiuj estas menciitaj en la antikvaj egiptaj dokumentoj kaj kiuj kontribuis al la fino de la Bronzepoko estas indiĝenaj popoloj de Anatolio.

Laŭ novaĵo de ĵurnalo *'Independent'*, arkeologoj sukcesis deĉifri antikvajn hieroglifojn trovitajn en skribaĵo sur ŝtono en Turkujo, kiu estis el antaŭ ol 3 200 jaroj. Esploristoj precizigas, ke la malkovro povos respondi al "unu el la plej grandaj enigmoj de la mediteranea arkeologio".

Laŭ la novaĵo, en la jaro 1878, 29 metrojn longa friso el kalkŝtono, troviĝis en *Beyköy* vilago, 34 km-ojn for en la nordo de *Afyonkarahisar*-urbo. La franca arkeologo George PERROT kopiis la skribaĵon, antaŭ ol la vilaĝanoj forportis tiun ŝtonon, por uzi ĝin kiel fundamenton en nove konstruata moskejo.

**"La plej longa hieroglifo el la Bronzepoko"**

Laŭ la novaĵo, kiun la rusia novaĵagentejo *'Sputnik'* transdonis, la plej longa antikva skribaĵo restanta el la Bronzepoko estas en la Luvi-lingvo, kiun nuntempe povas legi nur kelkaj homoj.

Novaj malkovroj ekaperis danke al la laboro de nederlandaj kaj svislandaj grupoj de arkeologoj. En tiu grupo troviĝas Dr. Fred WOUDHUZIEN, kiu estas unu el la 20 homoj, kiuj povas legi la Luvi-skribon. Kaj la tradukaĵon de tiu antikva skribaĵo faris WODHOUZIEN.

**"Malkovriĝis la identeco de la misteraj maraj popoloj"**

Oni diras ke la teksto povos lumigi la fakton kiel la evoluiĝintaj kaj potencaj civilizacioj de la Bronzepoko disfalis. La teksto rakontas kiel la reĝejoj en Malgrandazio aŭ Anatolio unuiĝis kaj kreis floton por invadi la apudmarajn urbojn en la orienta Mediteraneo.

La esploristoj raportas, ke la skribaĵon pretigis KupantaKurunta, la reĝo de *Mira*, en la jaro a.K. 1 190 dum la malfruaj tempoj de la Bronzepoko. Laŭ la skribaĵo, la Anatoliaj civilizacioj, inkluzive de *Mira*, invadis antikvan

Egiptujon kaj aliajn partojn de la orienta Mediteraneo antaŭ ol la fino kaj dum la fino de la Bronzepoko.

Arkeologoj dum longa tempo sciis ke la senkontrola disfalo de la civilizacioj en la jaroj ĉirkaŭ a.K. 1 200, okazis pro la efekto de sturmoj kiuj venis el la maro. La batalo de Trojo okazis dum la periodo ke la civilizacio de Miceno sturmis Anatolion, kvankam post la milito disfalis ankaŭ la Micena civilizacio. En Anatolio post la Brozepoko dum kelkaj jarcentoj regis ia “malluma epoko”.

La nuntempaj arkeologoj nomas tiun misteran popolon “Maraj Popoloj de Trojo”. Dum longa tempo oni diskutadis pri kiuj ili estis. La antikvaj skribaĵoj trovitaj en Egiptujo montras, ke tiuj popoloj ankaŭ invadis Kipron kaj Sirion.

**“Eble la plej granda enigmo de la Mediteranea arkeologio estos solvita”**

La kopio de la skribaĵo troviĝis inter la posedaĵoj de James Melleart, historiisto pri antikvaj epokoj, post lia morto en 2012. La filo de Melleart donacis la kopion al Dr. Eberhard Zangger, la ĉefo de ‘Fondaĵo pri Luvi Esploroj’.

La svislanda lingvisto kaj fakulo pri la Luvi-lingvo Dr Zangger taksis la rezultojn per la jenaj vortoj:

*"Luvianoj, kiuj estis loĝantoj de la okcidenta Anatolio, estas certe tiuj kiuj kontribuis al la okazaĵo nomita ‘Invadoj de Maraj Popoloj’ kaj al la fino de Bronzepoko. Tiel unu el la plej gravaj enigmoj de la mediteranea arkeologio eble estos solvita.”*

La tuto de la deĉifrita teksto kaj la esploro estas publikigota en la decembra numero de la scienca revuo ‘Procedoj de la Nederlanda Arkeologia kaj Historia Socio’.

[1] Maraj popoloj: La Maraj popoloj, aŭ Popoloj de la Maro, estis alianco de maristaj rabistoj (do piratoj) de la Egea kaj Tirena Maroj, kiuj navigis ĉirkaŭ la orienta Mediteraneo kaj invadis Malgrandazion, Sirion, Kanaanon, Kipron kaj Egiption fine de la bronzepoko. La Maraj Popoloj estas dokumentitaj fine de la Deknaŭa Dinastio de Egiptio kaj speciale dum la oka regojaro de Ramseso la 3-a de la Dudeka Dinastio de Egiptio kiam ili provis eniri kaj kontroli la teritorion de Egiptio. Inter la Maraj Popoloj identigitaj en la egiptaj registroj estas la ekveŝoj, grupo de bronzepokaj grekoj el Aĥeo; la tereŝoj, grupo de la Tirena Maro, la antaŭuloj de la etruskoj; la likoj, anatolia etno de la Egea Maro kies nomo postvivis en la regnonomo Likio; etno egipte nomita *ŝerden*, probable el Sardinio; etno egipte nomita *ŝekeleŝ*, italikoj el Sicilio; popolo egipte nomita *peselet*, probable la filiŝtoj eble venintaj tra la insulo Kreto kaj etno egipte nomita *tekrur*, rilata al la posta loĝantaro de Trojo la lastaj du el la Maraj Popoloj kiuj poste firme setlis en Levantenio. (el Esperanto vikipedio).

[2] Anatolio aŭ Malgrandazio: Terpeco, kiu etendiĝas el Azio al okcidento, ĉirkaŭata de la Nigra, Egea kaj Mediteraneo maroj, la granda parto de Turkujo nuntempe.

Fonto: t24.com.tr

Vasil Kadifeli
Turka Stelo, n-ro 24

# Verdaĵ-kovritaj tegmentoj malvarmigas

Kiel forigi someran varmegon el urbegoj? Simpla solvo povus havi surprize fortajn efikojn: Oni plantu verdaĵojn sur tegmentoj.



Se oni pensas pri la pasinta somero, oni rememoras ke la temperaturoj en grandaj urboj atingis 35 gradojn C kaj dumnokte restis varmego kun 27 gradoj C. Oni parolas pri la varmeg-insula efiko en grandaj urboj kiu kaŭzas tie plialtiĝon de la temperaturo kompare al la kampara ĉirkaŭaĵo. Kaj tiu efiko havas negativajn konsekvencojn por la sano de la enloĝantoj.

Rimedon kontraŭ tiaj varmeg-insuloj prezentas verdaĵ-kovritaj tegmentoj. Ĉar estas kunteksto inter planta kovraĵo kaj surfaca temperaturo: Ju pli da plantoj. des pli malvarma estas la grundo kaj sekve ankaŭ la aero. Nun la tuttera klimata ŝanĝo plifortigos la somerajn ekstremojn de la temperaturo kaj tiel levas la varmeg-insulan efikon al pli alta nivelo.

Por elkalkuli kiom da tegmenta areo precize devus esti kovrita de verdaĵo por kompensi la aldonan plivarmiĝon pro la klimata ŝanĝo, esploristoj en Seviljo, la ĉefurbo de Andaluzio, faris teston per la ekzemplo de sia urbo. Tie fine de la nuna jarcento verŝajne la someraj maksimumaj temperaturoj situos inter 1,5 kaj 6 gradoj C pli alte ol hodiaŭ. Laŭ la esploristoj inter naŭ ĝis 41 procentoj de la tegmentaj areoj de Seviljo devus esti verdaĵ-kovritaj por rebati la klimatan efikon sur la varmeg-insuloj en la urbo.

Eĉ se ne eblas atingi tiun procentaĵon la plantoj sur tegmentoj havus pozitivajn efikojn, ne nur rilate al malvarmiga efiko. Ili ankaŭ havas izolan efikon kaj tial la koncernaj konstruaĵoj bezonas malpli da klimatizado. Vegetaĵoj krome filtras la aeron, absorbas karbondioksidon kaj ĉe fortaj pluvoj funkcias kiel akvoretenilo. Tio validas por ĉiuj urboj kun varmeg-insuloj.

Oni scias jam el testoj en aliaj urboj kiel efikas verdaĵ-kovritaj tegmentoj. En Ĉikago ekzemple la temperaturo de verdaĵ-kovrita tegmento dum somero atingis 33 ĝis 48 gradojn C, dum sur najbara tegmento sen plantoj la temperaturo atingis 76 gradojn C. Sekve ankaŭ la aera temperaturo super la plantkovrita tegmento estis averaĝe je kvar gradoj pli malalta.


Tamen verdaĵ-kovritaj tegmentoj ĉiukaze nur povas prezenti parton de solvo, ĉar por malaltigi la temperaturon sur grunda nivelo necesas kromaj paŝoj. Oni tie havu fontanojn, arbojn kaj portempe pendigitajn sunvelaĵojn. Kaj asfalto kun malfermaj poroj povus reteni akvon kiu dum varmego povus vaporiĝi kaj tiel produkti vaporiĝan malvarmon.

Do, ju pli da plantoj kreskas en urbo, des pli agrabla estas la klimato.

Esperanta Retradio

# Aviadilo faris krizan alteriĝon pro nomo de sendrata reto

Ĵaŭde, la 30-an de novembro, iu aviadilo de la flugkompanio "*Turkish Airlines*" decidis fari krizan alteriĝon pro tio, ke la timiga nomo "enaviadiligita bombo" estis donita al iu sendrata reto kreita de nekonata pasaĝero.



Post rimarki la ekziston de tiu reto, la teamo de tiu aerflugo, kiu estis veturanta de Najrobo (Kenjo) al Istanbulo (Turklando) decidis fari paŭzon en la flughaveno de Ĥartumo (Sudano), kie la aviadilo estis esplorita kaj aprobita por daŭrigi la veturadon.

*Turkish Airlines*, per komunikaĵo al la gazetaro asertis, ke "laŭ fakuloj tiu sendrata reto estis kreita enaviadile. Oni ne trovis malkonformiĝojn dum la sekureca inspektado efektivigita, kaj la pasaĝeroj estis revenigitaj al la aviadilo".

La flugfirmao ne informis, ĉu la aŭtoritatoj malkovris la kreinton de tiu sendrata reto, kiu timigis la skipon.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

---



## Bildo de la tago

**Ardeo de *New South Wales*, Aŭstralio.**

**Vikipedio**



## France Prešeren

France Prešeren (naskiĝis la 3-an de decembro 1800 en *Vrba na Gorenjskem*; mortis la 8-an de februaro 1849 en *Kranj*) estis slovena poeto. En la jaro 1844 li verkis poemon *Zdravljica* kiu estas oficiala himno de la Respubliko Slovenio.

En Esperanto aperis: *Komenco de serenado*.

Vikipedio

## Géza Laczkó



Laczkó Géza d-ro [pr. lacko:] estis hungara verkisto, teatrokritikisto naskiĝinta en Budapeŝto la 3-an de decembro 1884 kaj mortinta en Budapeŝto la 1-an de decembro 1953.

En Esperanto aperis: *Ĉe la bordo de l' skita maro*.

Vikipedio



## Ludvig Holberg

Ludvig Holberg [LUDvig HOLberg] (3-an de decembro 1684–28-an de januaro 1754) estis verkisto, filozofo, historiisto kaj dramisto. Oni konsideras Holberg kiel fondinton de la modernaj dana kaj norvega literaturoj.

En Esperanto aperis: *Jeppe sur la Monto*.

Vikipedio

## Seán Ó Ríordáin



Seán Ó Ríordáin (3-a de decembro 1917 – 21-a de februaro 1977) estis la plej eminenta irlandlingva poeto en la 20-a jarcento.

En Esperanto aperis: poemoj en *Noktaj Papilioj.*

Vikipedio